


# TEA-BULTENO


2ª JARO | MAJO 1999 | NUMERO 5



## AGENDO



| | | |
|---|---|---|
| 1 | S | |
| **2** | **D** | |
| 3 | L | Progresiga kurso |
| 4 | M | Ordigo de asocia arkivo |
| 5 | M | |
| 6 | Ĵ | |
| 7 | V | Tradukvespero |
| 8 | S | |
| **9** | **D** | |
| 10 | L | Progresiga kurso |
| 11 | M | Ordigo de asocia arkivo |
| 12 | M | |
| 13 | Ĵ | **Estrarkunsido** |
| 14 | V | Ni krucvortumu! |
| 15 | S | |
| **16** | **D** | |
| 17 | L | Progresiga kurso |
| 18 | M | Ordigo de asocia arkivo |
| 19 | M | |
| 20 | Ĵ | |
| 21 | V | Ludkarta vespero |
| 22 | S | |
| **23** | **D** | |
| 24 | L | Progresiga kurso |
| 25 | M | Ordigo de asocia arkivo |
| 26 | M | |
| 27 | Ĵ | |
| 28 | V | El la Esperanta gazetaro |
| 29 | S | |
| **30** | **D** | |
| 31 | L | Progresiga kurso |



## Grava!!!

En la decembra numero de TEA-BULTENO ni aperigis la anoncon pri la eblo, ke la eldonejo *Vallardi* publikigu poŝformatan vortareton itala-esperantan/esperanta-italan, kondiĉe ke estu certigita antaŭvendo de ĉ. 1000 ekzempleroj. Nun **Fei** aktiviĝas tiucele kaj invitas la esperantistaron subskribi sindevigon de aĉeto de tiu publikigota libreto.

Jen kelkaj priaj detaloj: *Vallardi* jam eldonas serion da poŝvortaroj, ambaŭdirektaj, en diversaj lingvoj. La libretoj mezuras cm. 7,5x11 kaj konsistas el 500 paĝoj. Prizorgos la itala/esperantan version (kaj inverse) Davide Astori (la aŭtoro de la jam publikigita **Parlo Esperanto**) kaj Umberto Broccatelli. Kio plej gravas, estas la fakto ke ĝi estos aĉetebla en ĉiu itala librovendejo (kaj ne malpublike en Esperanto-klubejoj!) je la prezo de ĉ. 20.000 italaj liroj. Tial **Fei**, fide je amasa subteno, ekorganizas la antaŭvendon: grupoj kaj asocianoj povas antaŭmendi kopio(j)n de la vortaro, kontraŭ la reduktita prezo de 15.000 liroj, inkluzive de ekspedo-kostoj, nenion pagante anticipe, ĝis kiam oni ne sukcesos atingi la celitan nombron de 1000 ekzempleroj. Nur kiam estos certigita la eldonado, la subskribintoj devos pagi almenaŭ la duonon de la totala kosto de la antaŭmenditaj kopioj. De tiam pasos ĉirkaŭ unu jaro, antaŭ ol estu fine eldonitaj la vortaretoj. Nur kiam ili aperos surmerkate, oni elpagos la ŝuldon kaj ricevos la menditajn librojn.

Kiel ni siatempe sciigis, **Tea** decidis mendi 30 ekzemplerojn, sed ĉiu ajn povas mem alturni sin aŭ al **Fei** aŭ al **Tea**-sekretariino, por persone mendi pliajn aŭ plialtigi la nombron de tiuj vortaroj, kiujn nia grupo planis aĉeti. Ni ne maltrafu ĉi gravan okazon elmontri niajn instruilojn publike, en la surstrataj «libro-servoj», en kies montrofenestroj ĉiu alia lingvo nek malavaras nek hontas prezenti siajn literaturajn, gramatikajn, k.a. trezorojn: ĉu ne estis unu el niaj plej grandaj revoj, ke niaj libroj paradu, kune kun aliaj el iu ajn lingvo, sur la bretoj de ĉiuurbaj librovendejoj? Plurmilope ni jesu al tiu propono kaj vaste malfermu nian monujon por subteni ĉi tiun iniciaton: el ĉio ĉi certe eliĝos nur avantaĝoj.

Tiela la teksto de slipo sendenda al **Fei**:

**Alla Federazione Esperantista Italiana - Via Villoresi 38 - 20141 Milano**


**Io sottoscritto/a: *(indicare Nome, Cognome, Indirizzo, Località, N° telefono)* m'impegno all'acquisto di nr........ copie del Dizionario Tascabile Italiano-**

**Esperanto/Esperanto-Italiano, che sarà edito dalla Vallardi, qualora si raggiunga il numero di prenotazioni richiesto, al prezzo ridotto di L. 15 000 a copia. M'impegno a versare almeno il 50% dell'importo appena la pubblicazione sarà confermata. Verserò il saldo, una volta avvenuta la pubblicazione, secondo le modalità che verranno indicate.**
**In fede, *(firma)* ..............  Data....................**

## JAM 2000 ALIĜIS AL BERLINO

La 19[an] de marto la kongresa fako de UEA registris la 2000-an aliĝon al la 84[a] Universala Kongreso en Berlino (31 julio - 7 aŭgusto 1999). La ĝisnunaj aliĝintoj reprezentas 56 landojn. Plej multnombras la gastiganta lando Germanio kun 418 aliĝintoj. Sekvas Francio (232), Pollando (162), Japanio (149), Nederlando (83), Svedio (77), Italio (74), Litovio (64), Belgio kaj Britio (po 61), kaj Finnlando (54). Apud Japanio la plej multnombraj ekstereŭropaj landoj ĝis nun estas Brazilo (37), Usono (31) kaj Aŭstralio (16).

*Informis: CO de UEA <uea@inter.NL.net>*



## Elektoj en Kuba E-Asocio

De la 10[a] ĝis la 11[a] de marto 1999 oni okazigis la 16[an] Komitat-kunsidon de KEA, dum kiu estis elektita la nova estraro. Jen ĝia konsisto:

Maritza Gutiérrez - **Prezidantino**
Juan Ramón Rodríguez - **Ĝenerala Sekretario**
Pedro Fernández - **Kulturo**
Manuel Rodríguez - **Publikaj Rilatoj**
Héctor Jiménez - **Edukado**
Marta Alonso - **Financoj**
Alberto García Fumero - **Informado**
**Komisiitoj**
Felicia Rosé - **Libroservo**
Roberto Torres - **KEATUR**
Juan L. Besada - **Atento al verkistoj**

La Prezidanto de la estraro en Havano estas nun Julián Hernández, dum jaroj Prezidanto de KEA. Sekve, inter la 11[a] kaj 13[a] de marto, sukcese sesiis en la kuba ĉefurbo la 3[a] Nacia Kongreso de KEA. La Kongreson partoprenis ĉirkaŭ 150 homoj, el kiuj deko da eksterlandanoj, entute samideanoj el 8 landoj. Oni ĝuis prelegojn, artan vesperon, rondan tablon, aŭkcion, forumon pri la rolo de Esperanto en la tria jarmilo, ktp.

S-ro Juan Ramón Rodríguez, tiama respondeculo pri publikaj rilatoj, kaj membro de la komisiono pri Ameriko, ĉeestis la 4[an] Tutamerikan Kongreson de Esperanto okazinta en Bogoto, Kolombio, de la 27[a] de januaro ĝis la 3[a] de februaro.

Vigle agadas la kubanoj ĉiukampe kaj, por plifirmigi la kontaktojn inter siaj membroj, ja oni aperigados novajn bultenojn:

☆ LA ESPERANTA PERLO. Sub redaktado de Luis M. Vergel, ĝi aperos kvarfoje jare. Poŝtokesto 117, Cienfuegos, Kubo 55100.

☆ LA FAMO. Ĝin redaktas Tirso Avila Bory. Poŝtokesto 51, Guantánamo, Kubo 95100.

S-ro Jorge Luis González Santillán gajnis la premion en la unua etapo de konkurso pri historio de la loka movado, okaze de la 20[a] datreveno de KEA. La rezultojn de la dua etapo oni diskonigos la 14[an] de majo.

En decembro okazos en Havano Kongreso de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo - IKEK, por kies realigado jam delonge oni laboradas.

Informis, interrete, Alberto Rodríguez Pineda
Kuba Esperanto-Asocio - kubesp@ip.etecsa.cu
http://www.infocom.etecsa.cu/new/esperanto/index.htm

## Niaj rendevuoj en Italio

### Unue en Milano

por interregiona renkontiĝo, dimanĉon la 16[an] de majo, dum kiu oni diskutos pri tre tikla demando: «Kia politiko, neŭtrala, por la Esperanto-movado defende de la homaj rajtoj, kaj aparte de tiuj lingvaj?» Jen detala programo de la kunveno:

| | |
|---|---|
| 10.00 h. | Ĉe la nova sidejo en *Via Clusone 5* prelegos prof. Giordano Formizzi: «Kio defende de la lingvaj rajtoj: ĉu angla aŭ itala?»; d-ro Giancarlo Sartorio: «Politiko, ĉu ĝi povas esti neŭtrala? Rajtoj, kiel elekti ilin?». |
| 12.15 h. | Tagmanĝo ĉe restoracio *MIRÒ (Via Bergamo n° 1)*. |
| 14.15 h. | Elekto inter du vizitindaĵoj: →Galerio de Moderna Arto ĉe *Villa Reale* (Canova, Segantini kaj francaj impresionistoj) →Muzeo de Naturscienco. |

Partoprenkotizo egalas al 45.000 liroj, inkluzive de tagmanĝo kaj muzea vizito. Kiel eble plej frue oni sin anoncu al: Giovanni Conti - tel. 02-66301958; Aldo Foà - 0240070819; Ermigi Rodari - 02 2364190.

### Kaj poste en Mantova,

kie la loka grupo kunlabore kun la Hebrea Komunumo, organizas dimanĉe la 23[an] de majo, Esperanto-renkontiĝon.

| | |
|---|---|
| 09.30 h. | Rendevuo en *Piazza Anconetta*, ĉe la aŭtoparkejo; |
| 10.00 h. | vizito al la Sinagogo - *Via Govi* - kaj bonveniga akcepto de la Prezidanto de la Hebrea Komunumo; |
| 12.30 h. | tagmanĝo ĉe restoracio *AI 2 CAVALLINI - Via Salnitro 5*; |
| 15.00 h. | vizito al ekspozicio de Raffaello en Palaco *TE*. |

Kiuj intencas partopreni, estas petataj anonci sin telefone: Laura Brazzabeni 0376-926099 aŭ 0376-559094 (vespere), aŭ ret-poŝte: lbrazza@iol.it

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

# MAJO 1999

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | **3** | **10** | **17** | **24** | **31** |
| Mardo | | **4** | **11** | **18** | **25** | |
| Merkredo | | **5**<br>KODOMO-NOHI | **12** | **19** | **26** | |
| Ĵaŭdo | | **6** | **13** | **20**<br>ANTAŬTAGO DE SHAVUOT | **27** | |
| Vendredo | | **7** | **14** | **21**<br>SHAVUOT | **28** | |
| Sabato | **1**<br>INTERNACIA FESTO DE LA LABORISTOJ | **8** | **15** | **22**<br>SHAVUOT | **29** | |
| Dimanĉo | **2** | **9** | **16**<br>ĈIELIRO | **23**<br>PENTEKOSTO | **30** | |


# MAJO 1999

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | **3** | **10** | **17** | **24** | **31** |
| Mardo | | **4** | **11** | **18** | **25** | |
| Merkredo | | **5**<br>KODOMO-NOHI | **12** | **19** | **26** | |
| Ĵaŭdo | | **6** | **13** | **20**<br>ANTAŬTAGO DE SHAVUOT | **27** | |
| Vendredo | | **7** | **14** | **21**<br>SHAVUOT | **28** | |
| Sabato | **1**<br>INTERNACIA FESTO DE LA LABORISTOJ | **8** | **15** | **22**<br>SHAVUOT | **29** | |
| Dimanĉo | **2** | **9** | **16**<br>ĈIELIRO | **23**<br>PENTEKOSTO | **30** | |

**5759 HEBREA JARO**

**20-22 - SHAVUOT.**
Finiĝas la funebra periodo post Pesach, kiu daŭris sep semajnojn. De tio devenas la difino «Festo de la semajnoj» aŭ «Pentekosto». Ĝi memorigas, kiam Javeo donis al Moseo la Toraon (Pentateŭkon, kunaĵon de la unuaj kvin libroj de la Biblio - Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj kaj Readmono). Oni bele ornamas la sinagogojn per floroj kaj diversaj kreskaĵoj. Tiam estas celebrata la festo de rikolto.

**2559 BUDHISTA JARO**

**5 - KODOMONOHI** (Japanio).
Festo de la infanoj: en ĉiu familio, kie troviĝas virinfano, oni pretigas flor-aranĝojn el brilkoloraj iridoj. Eksterdome oni pendigas karpon el ŝtofo, kies balanciĝado laŭ ventoblovoj similas al naĝado de fiŝo, simbolo de forto kaj kuraĝo.

**2055 HINDUISMA JARO**

**1999 KRISTANA JARO**

**16 - ĈIELIRO (ANGLIKANA, EVANGELIA, KATOLIKA).**
En ĉi tago oni rememoras la leviĝon de Jesuo al la ĉielo, kvardek tagojn post Pasko. En Italio oni ĝin festas la postan dimanĉon.
**23 - PENTEKOSTO (ANGLIKANA, EVANGELIA, KATOLIKA)**
Oni celebras la malsupreniron de la Sankta Spirito sur Maria-n, la Patrinon de Jesuo, kaj sur la apostolojn vespermanĝe kunvenintajn.

**1420 ISLAMA JARO**

---

**1 - INTERNACIA FESTO DE LA LABORISTOJ.**
Tiutage oni reatentigas pri la homa rajto labori en sekurecaj kondiĉoj kaj por justaj salajroj.
Memorindas, ke la laboristaj rajtoj ne ĉiam kaj ĉiulande estas respektataj kaj ke multaj infanoj estas devigataj labori pro mizeraj vivcirkonstancoj. Tio kaŭzas la neadon al ilia plenrajto travivi serenan kaj feliĉan infanaĝon.

**5759 HEBREA JARO**

**20-22 - SHAVUOT.**
Finiĝas la funebra periodo post Pesach, kiu daŭris sep semajnojn. De tio devenas la difino «Festo de la semajnoj» aŭ «Pentekosto». Ĝi memorigas, kiam Javeo donis al Moseo la Toraon (Pentateŭkon, kunaĵon de la unuaj kvin libroj de la Biblio - Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj kaj Readmono). Oni bele ornamas la sinagogojn per floroj kaj diversaj kreskaĵoj. Tiam estas celebrata la festo de rikolto.

**2559 BUDHISTA JARO**

**5 - KODOMONOHI** (Japanio).
Festo de la infanoj: en ĉiu familio, kie troviĝas virinfano, oni pretigas flor-aranĝojn el brilkoloraj iridoj. Eksterdome oni pendigas karpon el ŝtofo, kies balanciĝado laŭ ventoblovoj similas al naĝado de fiŝo, simbolo de forto kaj kuraĝo.

**2055 HINDUISMA JARO**

**1999 KRISTANA JARO**

**16 - ĈIELIRO (ANGLIKANA, EVANGELIA, KATOLIKA).**
En ĉi tago oni rememoras la leviĝon de Jesuo al la ĉielo, kvardek tagojn post Pasko. En Italio oni ĝin festas la postan dimanĉon.
**23 - PENTEKOSTO (ANGLIKANA, EVANGELIA, KATOLIKA)**
Oni celebras la malsupreniron de la Sankta Spirito sur Maria-n, la Patrinon de Jesuo, kaj sur la apostolojn vespermanĝe kunvenintajn.

**1420 ISLAMA JARO**

---

**1 - INTERNACIA FESTO DE LA LABORISTOJ.**
Tiutage oni reatentigas pri la homa rajto labori en sekurecaj kondiĉoj kaj por justaj salajroj.
Memorindas, ke la laboristaj rajtoj ne ĉiam kaj ĉiulande estas respektataj kaj ke multaj infanoj estas devigataj labori pro mizeraj vivcirkonstancoj. Tio kaŭzas la neadon al ilia plenrajto travivi serenan kaj feliĉan infanaĝon.